# Dana Fervojisto 2

*ISSN: 1397-9914*

**70a jareldono** **Novembro 2017**




La venonta kongreso de IFEF okazos en Pollando – vidu paĝojn 7-8

## La somera ekskurso de DEFA

Nekredeble bonŝancaj ni estis la 11-an de julio, kiam ni ekskursis al la kastelo *Gavnø* kaj ties parko. Dum la tuta tago ne pluvis, estis sufiĉe milda senventa vetero, ka eĉ de tempo al tempo la suno brilis !

Ni ŝipvojaĝis de *Næstved* kaj alvenis ĝustatempe por la lunĉo, kiun ni ĝuis en la kafejo. Poste ni visitis la kastelan muzeon, la preĝejon kaj promenis en la parko, kie floroj floris, ĝardenistoj laboris kaj vizitantoj admiris la tuton.



DEFA-anoj en la parko de Gavnø

Per la 'lasta ŝipo de la tago' ni reiris al Næstved por disiĝi post bona tago kune.

Ni nun trifoje ekskursis en la proksimeco de *Næstved* – dufoje al *Karrebæksminde* kaj nun al *Gavnø*. Venontjare ni volas serĉi alian ekskurscelon – estas tiom da interesaj kaj vidindaj lokoj en nia lando.

# Bone kondutu en la trako

Estas grave konduti bone, kiam oni laboras en aŭ ĉe la trako. Povas kauzi akcidentojn gravajn ne nur por la traklaboristoj, sed ankaŭ por lokomotivestroj, kiuj riskas vundi aŭ eĉ mortigi homojn, kiuj ne foriras de la trako en la ĝusta momento. Estas por ĉiuj teruraj travivaĵoj, kaj Banedanmark ĉisomere lanĉis kampanjon por denove instigi al homoj scii pri la simplaj, sed tre gravaj reguloj.

- Donu signon
- Estu videbla
- Rigardu bone, antaŭ ol vi transiras la trakon
- Memoru, ke devas esti gardisto
- Respektu la sekurec-distancon
- Atentu pri viaj kolegoj
- Ordigu la areon, kiam vi finas la laboron kaj forlasas la lokon
- Konu la sekurec-regulojn

Estas reguloj, kiujn fakte ĉiuj konas, se oni iom pripensas la aferojn – tute logikaj aferoj. Tamen okazas daŭre, sed feliĉe ne tro ofte, akcidentoj ĉe la trakoj, ankaŭ en Danio.

En 2001 aperis angla filmo, ’The Navigators’, de la reĝisoro Ken Loach. Ĝi temas pri la temo de privatigo, kiam ne nur ŝtata entrepreno kiel ekz-e Banedanmark, sed multaj privataj entreprenoj prizorgu la trakojn. En Britio estis siatempe tiel, kaj la ĉefa parametro en tiuj konkurencoj por gajni la laboron estas ĉiam la prezo. En la filmo oni ’forŝparis’ ekz-e la gardiston, oni devigis al homoj resti pli longe en la trako, kiam venis trajno, labori tute proksime al la trako … kaj kompreneble en la filmo, pro pedagogiaj kialoj, okazis akcidento. Sed estas ne nur filmo, estas la vero.

Okazas ankaŭ ’preskaŭ-akcidentoj’, kie la traklaboristo sukcesas last-last-momente foriri de la trako, antaŭ ol trajno venas. Oni povus diri, ke jen – okazis nenio! Sed vere, tiuj okazaĵoj povas esti same pezaj por ekz-e la lokomotivestro kiel ’vera’ akcientoj. Estas terure vidi personon en la trako kaj scii, ke oni ne povas bremsi, antaŭ ol oni trafas tiun per-

sonon. Tiun travivaĵon kaj senton oni havas, ĉu la persono sukcesas forkuri aŭ ne.




La traklaboristoj bone scias kiel konduti. la kampanjo estas farita por instigi al ili konduti tiel!

Kaj kvankam ni ne estas ĉiuj traklaboristoj, ni ĉiuj konas nin mem. Se ni nur devas iri al alia flanko de strato, ni scias, ke ni devus atendi, sed ni tamen pensas: ’Mi bone atingos, antaŭ ol tiu aŭto venos.’ NE, ne ĉiam. La reguloj por traklaboristoj povas same bone valori por ni ‘aliaj’.

Fonto:
*Baneavisen* 13/2017

# DEFA-aktivecoj dum la vintro kaj poste.

Kiel ni kutimas, ankaŭ vintre 2017-2018 ni intencas kunveni unufoje monate. Ni ne havas fiksajn programojn, sed ni diskutas la novaĵojn ĉe IFEF, *Jernbanefritid* kaj *FISAIC,* solvas taskojn kaj ĝuas la kunestadon..

Pri la suba programo povos okazi ŝanĝoj, kaj ni petas vin informiĝi ĉe la prez.

**Marde, la 12an de decembro**. La jula aranĝo kun bona manĝo kaj gajaj partoprenantoj.
**Marde, la 9an de januaro.** Ni preparu prelegeton por prezenti dum la kongreso de IFEF en majo.
**Marde, la 20an de februaro.** Informoj ĉe la prez. pri preciza horo kaj loko.

**Marde, la 20an de marto** – la 70a naskiĝdatreveno de DEFA – iamaniere ni festos kune - informoj ĉe la prez.

## Aliaj Esperanto-aktivecoj en Danio:

### Kopenhago

***Kunvenoj de KEK*** (prezidanto: Bent Jensenius, tel 38 60 15 86, retadreso kek@esperanto.dk) okazas en *Kulturhuset, Tomsgårdsve*j 35, 2400 *Kbh NV*. Vidu ankaŭ www.esperanto.dk

### Århus

***Kontaktulo pri DEFA*****:** La prezidanto.
Kunvenoj okazas kunlabore kun la Esperantoklubo de *Århus* en *Folkestedet, Carl Blochs Gade* 28, 1ª etaĝo, salono 7, je h 19.30, la lastan ĵaŭdon de la monato.

### Norda Jutlando:

Kunvenoj de Nordjutlanda Esperanto-Klubo (informoj: Ejnar Hjorth, tel. 98 13 40 40) okazas en la vintra sezono (septembro-majo) ĉiumerkrede je la 15-a horo en *Christiansgade 38, 1., Aalborg*

# La 70-a IFK okazos en Pollando




De la 19-a ĝis 25-a de majo 2018 okazos la jubilea 70-a kongreso de IFEF en la pola urbo Vroclavo.

La programo estas kiel kutime multflanka kaj bunta:

- Organiza
- Faka
- Kultura
- Turisma

La aliĝilon vi povas peti papere de la prezidanto, sed kompreneble en la 21-a jarcento eblas aliĝi rete … lasta dato por 'frua aliĝio' (= malalta kongreskotizo) estas 31/12-2017.

Bonvenon al enhavoriĉa, travivaĵplena, kleriga, amika semajno!

## La fibraj kabloj translokiĝas …

Kiam, kiel estas tradicio, la kabloj estas metitaj EN la trako, la danĝero estas, ke ili estas detruitaj dum traklaboro. Cetere oni devas bloki la trajntrafikon, kiam a kabloj devas esti renovigitaj.

Novaj tempoj survojas. Du sekcioj de Banedanmark – Tekniko kaj Instalado – kunlaboras por produkti kablojn en tuboj, kiujn oni metas APUD la trako, ĉe la fervoja digo/heĝo. Tio malpliigas ĉiujn supre menciitajn malavantaĝojn.



Temas pri kabloj je entute 720 km da fervojlinio, kiuj poste troviĝos ne EN, sed ĈE la trako. Oni komencis per tiel nomata 'pilota' (prova) projekto en 2015, kaj poste en konekso kun traklaboro sur du diversaj linioj. Nun venas la tempo ne nur instali, sed adaptiĝi al la laboroj, projektoj kaj programoj dise en la lando, tiel ke oni ne ĝenas tro, sed povas meti la kablojn por gajni la multajn avantaĝojn.

Kiam tiu granda pulo estas finfarita, kaj oni estas en la ĝusta loko en la ĝusta horo kun la ĝustaj materialoj, la procezo estas rapida kaj efika – oni fosas, metas tubojn kaj fosas. La buĝeto estas entute iom pli ol 44 mio. EUR.

Du firmaoj estas konsilantoj en la projekto, kaj oni petis ilin kontroli la solvojn unu de la alia – kaj estas la samaj Banedanmark-dungitoj, kiuj devas validigi ĉion. Tiel oni sekurigas, ke estos similaj solvoj en la tuta lando, kaj estos relative facile poste bontenadi.

Fonto: *Baneavisen* 10/2017

## Personoj, kiujn ni konis ...

Ni rakontis pri niaj unuaj jaroj kiel Esperanto-parolantoj, kaj ni rakontis pri la loko, kie ni konatiĝis kun tiu komunumo, kiu donis al ni tiom da travivaĵoj, amikecoj, taskoj, defioj ... ni ne povas imagi al ni nian vivon sen Esperanto, kaj ni ne povas imagi la vivon sen la multaj homoj, kiuj instruis al ni, kun kiuj ni vojaĝis, kiujn ni vizitis ktp.

Jen kelkaj el ili:




Kiam ni alvenis al la klubo por la unua fojo, tiuj du viroj staris en la kuirejo ... eble ne tute ĝuste, sed almenaŭ estis tiel, ke kiam estis bezo-

no, oni helpis – pri ĈIO. Eble vi rekonas la du – Ejlif Andersen (dekstre), multjara prezidanto de DEFA Kopenhago, kaj Henning Hauge, same multjara prezidanto de DEFA, kasisto de IFEF kaj kun pluraj postenoj ĉe FISAIC.

Ejlif estis pezidanto de DEFA Kopenhago, kiam ni membriĝis, kaj ni certas, ke li kreis la etoson malferman kaj amikan, kiu kaŭzis, ke homoj simple ĝuis veni ĉiulunde – ĉu pluv- aŭ neĝ-vetero. Ni multon ŝuldas al li.

Henning estis la 'mentoro' de ni, precipe de Jan ... li vidis, fakte jam dekomence, kion povus fari Jan, kaj li gvidis lin per diversaj taskoj al prezidanteco de DEFA Kopenhago kaj poste DEFA, kiun Jan prezidis dum la malfacila periodo, kiam DEFA devis rezigni pri lokaj kluboj kaj sekve pri alta aktivecnivelo. Krome Henning kun la edzino Erna estis bonaj amikoj.



E. Henning Olsen



Svend Andersen

E. Henning Olsen estis nia instruisto – dum la unua vintro ni kune kun alia lernanto kaj Henning trakuris la kajerojn de 'ESPERANTO laŭ metodo Friis', tiel ke ni povis trapasi poste la unuagradan ekzamenon (tiama sistemo pri ekzamenoj). Kiam Henning esceptokaze pro deĵoro ne povis veni, Svend anstataŭis lin, kaj unu vesperon li prezentis al ni la korelativan tabelon. 'Lernu ĝin parkere,' li diris, 'aŭ vi estas perditaj!' Ekde tiam ni neniam forgesis!

Ekde tiam ankaŭ ni neniam pensis pri ekzameno denove - Henning kaj Svend instruis al ni sufiĉe bone!!!



Gunnar Thuesen laboris en la klubo pri multaj aferoj – li prelegis, verkis kantojn, faris ion ajn … sed la korinfano de li estis la faka laboro. Li verkis artikolojn kaj prelegojn, - li verkis ĉefprelegojn por almenaŭ du kongresoj de IFEF, kiuj okazis en Danio. Ideo de li daŭre vivas en la faka branĉo … li iniciatis la prorameron 'Aktualaĵoj de via lando', kiu nun nomiĝas 'Fakprelegetoj', sed kun la sama enhavo: suplemente al la 'granda' ĉefprelego por ĉiu kongreso ĉiu lando strebu prezenti ion – mallongan, ne tro detalan, sed certe interesan por la aliaj.

Gunnar estis gvidanto de la faka sekcio de IFEF kaj inspiris Jan, kiu nun havas tiun postenon kaj tiun taskon.



Alia Gunnar – Gunnar Hardrup – estis simple elstara persono, kaj estas ĝojo por ni, ke ni konis lin kaj havis multajn belajn horojn kun li.

Li komencis lerni Esperanton malfrue en la vivo, kaj li neniam fariĝis bonega parolanto, sed li estis tute kaptita de la ideo kaj laŭ nia opinio la perfekta 'Esperanto-apoganto'. Li lasis presi etajn paperslipojn kun la teksto 'Mi parolas Esperanton – ĉu vi?' (en la dana, komreneble), iris al sia loka biblioteko en *Gentofte* kaj metis la slipojn en librojn sur la regaloj.

Li estis malavara, kiam temis pri mondonacoj al bonaj celoj kun rilato al Esperanto – precipe la infanhejmon kaj -lernejon Bona Espero en Brazilo li subtenis per mono, kiam ĉiujare ni kolektis por sendi pakaĵojn kaj monon tien.

Gunnar vojaĝis kun ni al la tiamaj Nordiaj Kunvenoj, li festis kun ni (ankaŭ por si mem – i.a. a 90-a naskiĝdatreveno, de kiu estas la foto), kaj oni povas diri, ke kune kun Ejlif eble precipe Gunnar kreis la unikan etoson en DEFA Kopenhago.

Ĉiuj fotoj de la DEFA-arkivo.

J&L

# Vartrafiko - kunlaboro kaj fleksbleco por havi bonan vartransporton




*Høje Taastrup*

Kiam vi vidas 825 m longan vartrajnon, verŝajne vi ne pripensas, ke eble la veturkanalo, en kiu veturas la trajno, estas mendita unu jaron pli frue, aŭ eble estas transittrajno, kiu jam je la eniro en Danio estis malfrua laŭ la plano kaj pro tio ricevis novan veturkanalon. Vi ankaŭ ne pripensas la avantaĝojn de fervoja vartrafiko – ĉar la ŝarĝo estas peza, ĉar la ŝarĝo estas 'danĝera varo', aŭ ĉar simple estas bona solvo laŭ ekonomiaj vidpunktoj transporti per fervojo.

Aldone pripensu la grandan laboron pri fervoj- kaj pont-pagoj, kiuj estas necesaj, antaŭ ol la varoj povas survoji de A ĝis B – kiel enlanda vartrafiko aŭ kiel transit-transporto en la vartrafika koridoro, de kiu la itinero *Padborg*-Öresundponto estas parto.

Vartransporto sur fervojo estas multe pli ol nur horaroj por la trajno, - estas komplika laboro trovi por la var-klientoj la plej bonajn solvojn en ĉiuj manieroj.




*Padborg*

**Kanaloj**
Vetur-itineron kaj -tempon oni nomas kanalo. La plej multaj vartrajnoj en Danio estas transittrajnoj, kaj ofte ili eniras la landon kun malfruo. La sistemo estas farita kun 'malplenaj' kanaloj, tiel ke estas pli facile enmeti malfruan trajnon, ol se oni devus ŝovi la tutan planon kaj ĉiujn aliajn trajnojn.

La malfruon oni eble ne povas eviti, ankaŭ je eliro de Danio, sed la klientoj povas havi sufiĉe precizan imagon, kiam la trajno forlasas Danion.

**Terminaloj**
La 'kombi-terminaloj' en *Høje Taastrup, Taulov* kaj *Padborg*, kie oni ŝarĝas la varojn de kamiono al fervojo aŭ inverse, estas posedaĵo de Banedanmark. Diversaj eksteraj entreprenoj havas kontraktojn pri ekspluato. 'Laŭ fleksebleco ni ne povas konkurenci kun kamionoj, sed

ni povas klopodi fleksebligi laŭ nia plej bona kapablo – por la entreprenoj, kiuj ekspluatas kaj por iliaj klientoj,’ diras la sekci-gvidanto de klientrilatoj ĉe Banedanmark.

**Simplaj solvoj**

Ankaŭ alikloke en la lando (ol la tri grandaj terminaloj) oni klopodas per simplaj solvoj plibonigi la eblecojn por vartrafiko surrele – kiam temas pri veturkanaloj, kiam temas pri infrastruktura kapacito – por fleksebli kiel eble plej multe la vartrafikon en kaj tra la lando. Vartrajno povas longi ĝis 825 m – ne ĉiam estas ’vere simplaj solvoj’! ’Se ni volas vartrafikon surrele – kaj volonte PLI DA – ni devas kunlabori kaj aŭskulti al deziroj de entreprenoj kaj klientoj,’ oni diras en Banedanmark.

**Nova strategio**

Oni labras en Banedanmark momente pri nova strategio, kiu respegulas la subon – ke la ŝlosila vorto estas KUNLABORO inter ĉiuj aktoroj sur la scenejo.

**Faktoj:**

Entute malpli ol unu elcento de vartrafiko en kaj tra Danio estas surrele. Tamen estas sufiĉe granda amaso! Dum la lastaj tri monatoj de 2016 estis transportitaj 2.300 milionoj da tunoj. El tio estis

- 220 mio. enlandaj transportoj
- 381 mio. transportoj al kaj de Danio
- 1.729 mio. transitaj transportoj



# Novjara saluto de la prezidanto

Denove pasis unu jaro, kaj oni devas kiel kutime rigardi malantaŭen kaj antauen ĉe la sojlo de la nova jaro.

Feliĉe, kiam mi pensas pri DEFA, mi kiel prezidanto povas esti kontenta kaj ĝoji pri la laboro, kiun ni faras. Ni ne estas multaj, sed ni ‚metas niajn ovojn' en la korbo de IFEF, kaj tiel ni bone uzas niajn fortojn.

- Jan estsas gvidanto de la faka laboro kaj estrarano de IFEF
- Ni solvas la taskojn kiujn oni donas al ni
- Ni enpaĝigas kaj produktas la FervojFakan Kajeron ĉiujare, kaj por la IFK en Francio, kiun ni triope partoprenis, ni prezentis prelegeton pri Odense Letbane
- Ni verkas artikolojn por IF

Hejme ni kunvenas private ĉe unu el ni, - se la traklaboroj kaj aliaj aferoj ĉe DSB/Banedanmark tion permesas – kaj ni intencas daŭrigi tion. Venontjare DEFA iĝos 70-jara … ni jam havas certajn planojn festigi la ne tro junan, sed tre spertan kaj ĉarman sinjorinon!

Ni provas esti bonaj membroj de Jernbanefritid, kaj por ĉiu numero de ties bulteno ni verkas artikolon. En la reprezentantara kunveno komence de novembro tri el ni partoprenis.

Jan fariĝis ĝenerala sekretario de FISAIC komence de 2017, subtenata ne de la dana FISAIC-asocio Jernbanefritid, sed de IFEF. Granda respekto de FISAIC je la laboro de DEFA kaj IFEF.

Mi deziras al vi ĉiuj feliĉajn festotagojn kaj prosperan Novan Jaron.

JUN

**Dana Fervojisto estas organo de Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA)**

Prezidanto:
Jan U. Niemann
Hovedvagtsstræde 9 E, 1
DK-3000 Helsingør
tel 71 70 63 83
aŭ 71 72 32 42
niemann@kabelmail.dk

Kasisto: Karen K. Olsen
Manøvej 6
DK-4700 Næstved
tel  55 72 73 77
bankkonto (Lån&Spar)
0400 107 10 07539

Redaktantoj: Jan kaj Lene Niemann
Vidu adreson supre.

Preso:  HVS9E1

Redaktofino por venonta numero de Dana Fervojisto:

1/6-2018

# Enhavo:


| | |
|---|---|
| pağo 2 | Somerekskurso de DEFA |
| pağoj 3-4 | Bone kondutu en la trako |
| pağoj 5-6 | Aktivecoj |
| pağo 7 | La fibraj kabloj |
| pağoj 8-11 | Personoj, kiujn ni konis |
| pağoj 12-14 | Vartrafiko |
| pağo 15 | Novjarvortoj de la prezidanto |


## UEA kongresos denove en Eŭropo – ĉu vi iros al Portugalio kaj Lisbono en 2018?

103a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO
LISBONO 2018
28 JULIO – 4 AŬGUSTO

La kongreso okazos de la 28-a julio ĝis la 4-a de aŭgusto. Ĝis nun aliĝis 239 personoj el 44 landoj.